BELGIO NEDERLANDO GERMANIO E

**Senlime**

**Groupe espérantiste de Verviers**

# La Voĉo de Esperanto-grupo Verviersa

**Avec le soutien de la Fédération Wallonie-Bruxelles**

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN LA VERVIERSA REGIONO

**En cas de non-distribution, merci de renvoyer à l'éditeur responsable:**
Jean-Marie **Jacques**,
5 rue Joseph Wauters
BE-4800 VERVIERS


**Informations en français**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
Mail: jeajacques@voo.be
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren.media@planet.nl
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: klaus.hogen@web.de
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH


**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe**
**http://esperanto-grupo-verviers.simplesite.com/**444658431

**Prezoj por BE, NL kaj DE:**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Abono al la **papera** versio de nia informilo (12 €) eblas sed **NE** enhavas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

Bonvolu pagi prefere jam en januaro **NUR** al la konto :
**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta) de ***Senlime***,
25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio

# ENHAVO :


**p. 1: Sans anti-virus... / Sen kontraŭviruso...!**
**p. 2: Verviersa kalendaro 2021 (1)**
**p. 3: Niaj programeroj lupee**
**p. 4: "Verviersa" angulo (Revivigo de la Virtuala Kongreso)**
**p. 5: Ideo de *senlima* amikeco.**
**p. 6: La fina venko...**


---

En premier lieu, permettez-moi de vous souhaiter, au nom du comité du groupe espérantiste de Verviers, ***une très bonne année 2021!***

Dans notre dernier numéro (2020-4), nous vous avions donné l'espoir d'une reprise normale de nos activités à La Calamine, mais – si l'assemblée générale a pu se dérouler normalement en septembre devant un public international - en octobre, la mobilisation générale contre le virus s'étant un peu (trop) relachée, de nouvelles mesures devenaient inévitables et nous avons publié sur YouTube la conférence de Raymond **Demarche** (mots français surprenants), qui avait bien eu lieu comme prévu au Sélect. Mais celui-ci est depuis lors fermé, ce qui implique la suspension de nos activités jusqu'au 19 mars 2021 ***(si rien ne s'y oppose)***, avec la conférence de Raymond **Demarche** sur Lilian Jackson **BRAUN** et le chat qui...

Pour plus d'informations, ne manquez pas de visiter notre site internet: *http://esperanto-grupo-verviers.simplesite.com/*

---

Unue permesu ke mi deziru al vi, nome de la komitato de la esperantista grupo de Verviers, ***bonegan jaron 2021an!***

En nia lasta numero (2020-4), ni donis al vi la esperon pri normala rekomenco de niaj agadoj en Kelmiso, sed - se la ĝenerala asembleo povis normale okazi en septembro antaŭ internacia publiko - en oktobro, la ĝenerala mobilizado kontraŭ la viruso iom (tro multe) malstreĉiĝinte, novaj rimedoj fariĝis neeviteblaj kaj ni publikigis ĉe YouTube la prelegon de Raymond **Demarche** (franclingvaj vortoj surprizaj), kiu tamen efektive okazis kiel planite en la Select... sen eksterlanda publiko. Sed tiu-ĉi nun denove estas fermita, kio implicas la ĉesigon de niaj agadoj ĝis la 19a de marto 2021 ***(se nenio kontraŭas tion!)***, kun la prelego de Raymond **Demarche** pri Lilian Jackson **BRAUN** kaj la kato kiu...

Por pliaj informoj, nepre vizitu nian retejon:
*http://esperanto-grupo-verviers.simplesite.com/*

# ESPERANTO✪ KALENDARO 2021 (1)

***La grupo de Verviers*** publikigas ĉi-tie sian propran programon.

Tradicie, ***Trilandaj renkontiĝoj*** est***u*** organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ grupo en la Eŭregiono Mozo-Rejno.

Ili iam okazis dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL)...

Pro tio, tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de aliaj lokaj grupoj sed ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de Eo-aranĝoj (aliaj ekzistas).

**Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro kaj sekretario de la Verviersa Eo-grupo (*Senlime*-Verviers):**

**Jean-Marie Jacques (jeajacques@voo.be).**

| | |
|---|---|
| **01-15 Vintra** paŭzo: ni **NE** kunvenos. | **15-01** Pause hivernale: nous **NE** nous réunirons **PAS**. |
| **02-19 Vintra** paŭzo: ni **NE** kunvenos. | **19-02** Pause hivernale: nous **NE** nous réunirons **PAS**. |
| **03-19** 20h00 Kelmis, Select: “Lilian Jackson BRAUN”: prelego de Raymond Demarche.<br>Inf. jeajacques@voo.be | **19-03** 20h00 Kelmis, Select: “Lilian Jackson BRAUN”: conférence de Raymond Demarche.<br>Inf. jeajacques@voo.be |
| **04-16 ---> 04-18** Tilff: PEKo Printempa Esperanto Kongreso<br>Inf. info@verdajskoltoj.net | **16-04 ---> 18-04** Tilff: PEKo Congrès esp-iste du printemps<br>Inf. info@verdajskoltoj.net |
| **04-16** 20h00 Kelmis, Select: Historio de la kinarto (1: la naskiĝo).<br>Inf. jeajacques@voo.be | **16-04** 20h00 Kelmis, Select: Histoire du cinéma (1: la naissance).<br>Inf. jeajacques@voo.be |
| **05-21** 20h00 Kelmis, Select: Filmo de J. Jacob pri la “Reĝa Milita Tattoo en Edinburgo”.<br>Inf. J. Jacob (+32-87/22.10.79) | **21-05** 20h00 Kelmis, Select: Film de J. Jacob sur le “Royal Edinburgh Military Tattoo”.<br>Inf. J. Jacob (+32-87/22.10.79) |
| **06-18** 20h00 Kelmis, Select: Kutima junia **karaoke**o.<br>Inf. jeajacques@voo.be | **18-06** 20h00 Kelmis, Select: Habituel **karaoke** de juin.<br>Inf. jeajacques@voo.be |
| **07-17** Somera paŭzo: ni **NE** kunvenos en Kelmis. | **17-07** Pause d'été: nous **NE** nous réunirons **PAS**. |
| **07/17-24**: Universala kongreso de Esperanto en **Belfast**o. | **17-24/07**: Congrès universel d'espéranto à **Belfast**. |
| **08-20** Somera paŭzo: ni **NE** kunvenos en Kelmis. | **20-08** Pause d'été: nous **NE** nous réunirons **PAS**. |

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

**03-19** 20h00 Kelmis, Select: Prelego de R. Demarche pri Lilian Jackson **BRAUN**.




Tiu-ĉi estas usona romanistino, (1913-2011), aŭtoro de tridek-kelko da krim-romanoj, kies titoloj ĉiam estas "***La kato kiu…***".

Ŝia heroo estas siama kato nomita Koko. Anstataŭ havi 48 nazharojn, li havas 60. Ĉu tiu pluso sekvigus lian superecon? La mastro de Koko, Jim Qwilleran, estas skotdevena. Li estis kuirarta kronikisto ĉe la gazeto "Dayly Fluxion" en la antaŭrbo en kiu li vivis.
Post la morto krima de sia "onklino" Fanny Klingensĉoen, li fariĝis ŝia heredanto… troe riĉa. Tial li kreis fondaĵon nomdonatan.

Li plu kronikas en la gazeto de Pickax, sia paca loĝurbo, la eksa "Picayune". Koko, diplomita vic-enketisto, helpas sian mastron alportante indikaĵojn, kiuj sugestas ke… *(sekvota dum la prelego)*.

Inf.R.Demarche (+32-87/22.68.18)

**04-16** 20h00 Kelmis, Select: Elsendo de J-M Jacques pri **Historio de la kinarto** (1895-1916: la naskiĝo).

Kelkaj el vi foje rigardis filmo(j)n surtekstigita(j)n de ***Senlime*** (fakte pli ol 50 gravaj filmoj estas surtekstigitaj de J-M Jacques, kaj vi povis legi la liston en antaŭa numero de tiu-ĉi informilo).

La 17an de aprilo, vi povos (re)lerni pri la unuaj paŝoj de la kinarto, la naskiĝo (kaj la infanaĝo!) de tio, kio eble estas nun la plej populara arto, eĉ se nur la sepa… laŭ aper-ordo!

Memore kaj iel simile al Selim SASSON, la talenta prezentisto de la iama ĉiusemajna elsendo-serio "La Karuselo je imagoj" de la RTBF, la preleganto prezentos kelkajn filmojn el la pritraktata parto de la historio de la kinarto, kun elektita eltiro de ĉiu verko (eventuale surtektigita en esperanto… kiam temos pri parolanta filmo).

La unua "elsendo" montros la naskiĝon de la 7a arto per filmoj kiel *"Vojaĝo en la Lunon", "La murdo de la duko de Guise", "Cabiria" , "Perfidajho", "La naskiĝo de Nacio",…*

Se, pro la viruso aŭ alia kaŭzo, la prelego ne povos okazi, ĝi laŭeble estos surretigita per zoom.

Inf. jeajacques@voo.be

**05-21** 20h00 Kelmis, Select: Filmo de J. Jacob pri la "**Reĝa Milita Tattoo en Edinburgo**".

La "Reĝa Edinburga Milita Tattoo" aŭ simple ***Milita Tattoo***, estas internacia festivalo de militaj bandoj okazanta ĉiujare jam de 1950 en Edinburga Kastelo, Skotlando. Ĝi estas parto de la Edinburgaj festivaloj okazantaj en aŭgusto.

La plej elstara momento de la festivalo estas la parado de "pipes and drums" (sakŝalmoj kaj tamburoj), plenumitaj de regimentoj de la Brita Armeo, inkluzive de eksterlandaj civilaj kaj militaj sakŝalmoj.
La Edinburga Milita Tattoo 2018 festis la 100-jariĝon de la "Royal Air Force".



Pli ol 200.000 homoj vojaĝas al Edinburgo ĉiujare por ĉeesti prezentojn okazantajn dum pli ol 3 semajnoj. Televidoj el pli ol 30 landoj elsendas ĝin al tuta aŭdienco de 100 milionoj da spektantoj jare.

José JACOB prezentos al ni sian propran filmon pri tio.

Inf. J. Jacob (+32-87/22.10.79)

# Verviersa Angulo

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
Chemin de la Rostibouhaye 19
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79
Trésorier: D. Lousberg
Rue Pierre Fluche 25
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30
Secrétaire: J.M. Jacques
Rue Joseph Wauters 5
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

**Ass. pour l'Espéranto (A.P.E.):**
www.esperanto-wallonie.be
Valère Doumont, secrétaire
Rue des Champs 3
5060 Tamines (Sambreville)
Tél. 0485/517 552
doumontvalere@yahoo.fr

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*La cotisation pour **EGV-Senlime** reste fixée à **10 Euros** (ou 22 Euros si vous voulez un abonnement à cette revue sur papier).*

**Indiquez les nom, prénom et domicile du membre cotisant: *«cotisation de .... pour .... »***

# ESPERANTO sur la reto

**Reviviga projekto de la Virtuala Kongreso**
gazetara komuniko de UEA N-ro 916 (2020-11-29)

**Ĉiuj VK-spektaĵoj baldaŭ en la JuTuba kanalo de UEA, UEAviva.**

Pli ol du mil membroj de UEA partoprenis aŭ poste spektis la programriĉan Virtualan Kongreson (VK) sen lasi sian hejmon. Por konservi tiun unikan sperton, UEA lanĉis la projekton Viva Virtuala Kongreso (VVK) en la JuTuba kanalo UEAviva (youtube.com/user/UEAviva).

Sekve ĉiuj esperantistoj nun povas libere sperti kaj rememori pri tiu kongreso. Jam du monatojn, iom post iom oni enretigas la programerojn de la kerna VK, tio estas, la spektaĵojn okazintajn dum VK-semajno (1-8 de aŭgusto) ĉiutage inter la 12-18-a horo UTC.

Por konservi la kongresan strukturon kaj por faciligi trovi ĉiun programeron estis kunmetitaj tabelo kaj listo de programeroj, similaj al tiuj de tradicia Universala Kongreso. La listo kaj la tabelo estas libere alireblaj ankaŭ en mondafest.net/programo.

La diversaj programeroj en la listo kaj tabelo estas kolorigitaj laŭ sia speco, ekzemple Kongresa temo, sciencaj programeroj (IKU, AIS, Scienca Kafejo), distraj (koncertoj, kantaj aŭ muzikaj eroj), kulturaj (literaturo, aŭtoraj momentoj), ekskursoj, prelegoj ktp.

Fine de la projekto estos videblaj ĉiuj spektaĵoj de la kerna VK-programo. Entute estas 99 programeroj, el kiuj pli ol 70 jam estas alŝutitaj al la kanalo de UEA en JuTubo; ĉiutage aldoniĝas unu programero.

UEA esperas, ke en tiu formo la unua Virtuala Kongreso de Esperanto plej utile konserviĝos en la reto kaj estos facile alirebla por ĉiuj esperantistoj. Kiel servo al la E-komunumo, UEA aparte invitas tiujn, kiuj siatempe ne povis partopreni, sperti la unuan Virtualan Kongreson per JuTubo. unu ĉe la alia.

---

Kelkaj el vi eble sin demandas kion tiu-ĉi artikolo "faras" sur la paĝo "Verviersa angulo"...

Efektive, tio ne rekte rilatas al Verviers, sed kio nune okazas en Verviers rilate al esperanto? Ve, ŝajne nenio...

Tamen esperantisto el Verviers partoprenis tiun virtualan kongreson (kaj esperantistoj el Verviers organizis kaj partoprenis kunvenojn en Kelmis)...

Eĉ se kursoj kaj kunvenoj (nedubinde provizore) ne plu okazas en Verviers, ja ekzistas en tiu urbo homoj kiuj agadas en kaj por esperanto, malgraŭ la tre malfacila situacio en kiu ni troviĝas...

# IDEO DE *Senlima* AMIKECO

En la komenco kiam D-ro L. L. Zamenhof kreis la lingvon Esperanto, tiam ne ekzistis Esperanta lernejo, nek universitato, kie oni povis lerni la lingvon, eĉ ne estis eblo ret-komunikadi unu kun iu alia.

Mi supozas, ke dum tiu tempo de D-ro L. L. Zamenhof iu havis libron/librojn, ke per tiu libro la persono praktikis la lingvon lernante kaj poste uzis ĝin kaj elĉerpis la lecionojn por instrui Esperanton al siaj kolegoj.
Estas kredeble, ke la kolegoj ricevis instruajn lecionojn de Zamenhof mem per koresponda kurso! Verŝajne la inter-komunikado fariĝis buŝe aŭ per reciproka korespondado.

Supozeble tiel la lingvo Esperanto ekkreskis en Pollando, kie loĝis Zamenhof, kaj de tie disvastiĝis en Eŭropo, Ameriko, Azio, Afriko kaj en aliaj mondpartoj. Se estas tiel, ke la lingvo survojis tutmonden per korespondado, tio montras, ke korespondado estu motoro de la Esperanto-movado, tiam, nun kaj poste!

Certe la edukado en ĉiaj klas-niveloj dependas de inter-komunikado de la instruisto kun la lernanto, la instruisto ĝenerale jam havas lingvokonojn kaj plen-edukon pri io instruota; tiel la instruisto portas sur si la devon verki taŭgajn lernmaterialojn, ĉar alimaniere neniel la instrua aktiveco utilus por si mem. Tamen la laboro de bona instruisto ne limigas sin nur al instruado de la koncerna temo, sed gravas ankaŭ krei bonan rilaton per inter-komunikiĝado kun reciproka amikiĝo!

Kial korespondi? Tio ĉi ne estas nova ideo, ĉar de longe D-ro L. L. Zamenhof planis tion, ke la lingvo Esperanto estu ponto inter la homoj, kiu kunligos ilin tra la tuta mondo! Ke ĝi estu ilo de la homaro por komuniki unu kun la aliaj. Tio estis kaj estas kaj estos!
Efektive nun estas kelkaj interesaĵoj kaj el inter la aferoj homkoro devas elekti!

Multaj instruistoj de Esperanto ŝatas aranĝi bonan instrumedion, klason, afiŝon, modernajn lernilojn kaj bonan kondiĉon por interesi la lernantojn al partopreno en la kursoj, sed tiuj forgesas prepari siajn studentojn al tio, kio estas la celo de la lingvo Esperanto!

Jes, ni ĉiuj dezirus havi bonan lernmedion, kunveni en la sama klaso kun modernaj lerniloj, sed al multaj el ni tio ne okazas tiel kaj ofte pro la lokaj kondiĉoj ili lernas/instruas Esperanton en malfacila lernmedio! Kelktempe ni lernas la lingvon kun ne similaj lermaterialoj, metodoj ks. Sed ni ĉiuj egalas dum la lingva praktikado parole aŭ skribe, ĉiu bezonas reciprokan rilaton.

Ĝenerale por la lingva praktikado oni konsilas serĉi korespond-amik-(in)on, sed nun la koresponda amikiĝo de eksterafrikanoj kun esperantistoj en Afriko estas rara varo. Imagu, ke ni esperantistoj en Afriko ne loĝas en samaj domoj, ke ni edukiĝis/as el la samaj gepatroj kaj ne bezonus korespondamikojn! Tute ne! Manko de korespondantoj al ni precipe por junaj esperantistoj kaŭzas izoliĝon kaj rompas la ideon pri amikeco senlima!

Mulele Mbassa,
ILEI-sekciestro en Tanzanio

El la revuo ESPERANTO
1352(12) Decembro 2020



Mulele Mbassa

# EN ĈIU MALBONO ESTAS IOM DA BONO ĈU NE PLIA PAŜO AL LA FINA VENKO ?

Ni tro ofte lasas nin superŝuti de niaj emocioj... Transe de la virusa katastrofo kiu trafas nin, ni ne perdu nian analizan kapablon!

Jes ja tiu viruso estas mortiga malsano kiun ni devas supervenki. Sed ni objektive analizu la situacion: jam de multaj jaroj la grupo esperantista de Verviers serĉas manieron allogi internacian publikon en Kelmis, kalkulinte pri la kuraĝo de la homoj por veturi kelkajn kilometrojn kaj eventuale transpasi landlimon.

Ve, plurfoje ni eĉ devis kvarope kunveni, inter komitatanoj de la grupo de Verviers! La bankroto de la iama restoraciestro de la Select bremsis nian agadon dum tuta jaro kaj nun la viruso same ĝenas.

Tre logike mi, kiel aliaj, turnis min al la reto kie mi – iom surprize – malkovris tre internaciajn kunvenojn (kun ĉirkaŭ 70 partoprenantoj el plej diversaj landoj!) de la Londona esperanto-klubo per ZOOM, komputila softvaro por aranĝi virtualajn renkontiĝojn inter entreprenoj, organizaĵoj... kaj jam utiligata de niaj lernejoj!

Imitante tiun ekzemplon, la Antverpena esperanto-grupo ankaŭ tiel kunvenis, kaj eĉ neatendite organizis Zamenhof-feston. Ĝis 100 parolantoj povas vive interagi kun video-spektantaro kiel dum vera, fizika kunveno. Necesas komputilo (tableto au poŝtelefono), kaj abono (malmultekosta) se vi volas mem organizi (longajn) kunveno(j)n.

APE kune kun la Brusela grupo ĵus aĉetis abonon al ZOOM. Ĉiuj membroj de APE povas disponi pri tiu abono por organizi kursojn aŭ 'konversaciajn tablojn'.

Ek de nun, la plej bonaj esperanto-instruistoj povos gvidi kursojn por foraj aŭ izolitaj lernantoj, kiujn ni ne estus povintaj allogi per loka kurso!

Alivorte, ek de nun ni disponas pri sistemo kiu facile permesas organizi senkontaktajn internaciajn kunvenojn, renkontiĝojn kaj eĉ plurtagajn kongresojn,...

Ĉar la kandidato-partoprenanto ricevas inviton kaj pasvorton, tiaj kunvenoj estas tre diskretaj kaj oni sentime povus, interalie, prezenti dokumentojn nekonvenajn por infanoj, submetitajn al kopirajtoj,...!


Koncerne la esperantistan grupon de Verviers, mi ripetu ke ni iris al Kelmis por okupi historian (“Amikejo”) kaj centran lokon (inter Belgio, Nederlando kaj Germanio).

Ve, la sukceso estis tre relativa kaj postulis la forlason de Verviers (kie ja ne estis facile trovi taŭgan lokon por kunveni!).

Hodiaŭ multe malpli gravas la loko: la plimulto de la homoj jam disponas pri ret-aliro kaj povus trovi nin sur la reto!

Nune ni vere povas preskaŭ senlime kunveni: ne plu ekzistas teritoria limo aŭ tro granda distanco: restas nur la financa limo (la materialo tamen iom kostas!) kaj la horara limo: ne ĉiuj el ni samtempe (kaj samlongtempe!) estas liberaj!

Nekontesteble, dank'al la viruso, malfermiĝis nova epoko por esperanto. Ni ekspluatu tiun novan eblecon!



Maldekstre: ekrano fotita dum zoom-kunveno Antverpena.